

FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAZ 6, rue de Mézières 75006 PARIS
Sekr: F-ino G. PREUX 55/3 Rés. La Terrasse Rue du 11 Nov. 59290 WASQUEHAL
Kasistino: S-ino J. VINCENT L' Oazo B. P. 54 49150 BAUGE
Peranto IKUE: P-ro R. DEGRELLE B. P. 23 54510 TOMBLAINE

C.C.P. Association Catholique Française pour l' Esperanto 2324 93 N ROUEN

==== la n^o: 6 F. Abono: 23 F (TTC). Kotizo: 7 F. Sumo: 30 F. ====

+++++

N.B. La materialo, por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent nepre antaŭ la
5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

+++++

==== N^o 141 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====
*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== JUNIO 1984 ====

+++++

BILETO DE LA PREZIDANTO

Dans la perspective d' utilisation d' une langue commune aux divers peuples de la terre, les espérantistes ont apporté mieux que des idées théoriques, mais l' expérience vécue de ce qui peut se concrétiser en ce domaine.

Il ne faut pourtant pas se bercer d' illusions; le succès total de la langue universelle ne peut aboutir qu' à long terme, au prix d' efforts, de travaux, de patience.

Le nombre de revues, la littérature, les congrès, la diffusion dans le monde entier, sont des acquis importants. Mais ils sont le résultat des efforts commencés il y a presque un siècle.

Beaucoup pensent au conditionnel "si telles instances internationales l'adoptaient, si l' enseignement de l' Esperanto était généralisé dans toutes les universités, si les sciences, le commerce, adoptaient cette langue à l' exclusion de telle langue nationale"...

Attendez-vous que les officiels, les hauts cadres de l' Université, les autorités religieuses, soudain conquis, en usent et en préconisent la pratique et l' enseignement? Que le miracle d' une décision des hautes instances l' impose soudain? Attente vaine, si d' abord l' Esperanto n' est pas reconnu comme pratiqué par de nombreux usagers, s' il n' est pas observé comme porteur d' une culture humaine spécifique ouverte sur l' "universel". Faut-il redire l' importance de l' écrit, livres, revues, notamment de l' édition des ouvrages de base sur lesquels reposent les diverses civilisations.

Pour nous, chrétiens, nous voulons être les porteurs de la spiritualité dans cette fraternité internationale qui lentement se construit. Le 1er mai se clôturaient à Lisieux les journées missionnaires; nous sommes interpellés par le rappel du devoir du chrétien, de chaque groupe de chrétiens, d' annoncer Jésus-Christ. Aux hommes de toutes tendances, à nous de transmettre le message de paix et d' amour apporté pour tous. Message en particulier par la présence au monde de la Parole, du Verbe adressé à tous, et c' est le rôle que doit jouer un langage fait pour rapprocher les hommes les plus éloignés dans un tout harmonieux.

..//...

LINGVA ANGULO

5 respondoj atingis la redakcion antaŭ la limdato, tiuj de G-roj BOURGOIS (Bo), BURSZTA (Bu), DAUCHEZ (Da), DEGOUL (De) kaj MICHAU (M).

1) jouer des jambes: ekkuri (Bo); forkuri senprokraste (Bu); kuregi, plene utiligi siajn krurojn (Da); krurmoviĝi (De); krurhelpe akceli ludon, lerte utiligi siajn krurojn (M).

2) il faut jouer le jeu: necesas agi konsekvence, necesas observi la ludregulojn (Bo); oni devas tiel fari (Bu); necesas uzi la metodojn de la aliaj (Da); oni devas regule ludi (De); necesas respekti ludregulon, utilas ludriski (M).

3) jouer les héros: aktori heroon, temerare agi (Bo); ŝajniĝi heroon (Bu); vanti, ŝajniĝi sin imitanta heroojn (Da); heroojn imiti (De); emfazi siajn meritojn (M).

4) jouer quitte ou double: ĉion riski en la ludo (Bo); retiriĝi aŭ riski duoble (Bu); akcepti riskon inter fiasko kaj sukceso (Da); ĉu gajni pli da ĉu ĉion perdi (De); lude duoblighi gajnon aŭ ĉion perdi (M).

5) jouer serré: lertege manovri, nemistrafe agi (Bo); ludi atenteme (Bu); prudente agi pro la risko (Da); provi venkon malfacilan (De); ĝisfunde ludbatali, utiligi ĉiujn ŝancojn (M).

6) jouer ses derniers atouts: ludi siajn lastajn atutojn (Bo); elĉerpi siajn lastajn atutojn (Bu); provi sian lastan ŝancon (Da); siajn lastajn atutojn riski (De); investi siajn lastajn atutojn (M).

7) jour pour jour: ekzakte samdate (Bo, M); en la sama datreveno (Da); je sama dato (De).

8) trouver un juste milieu: trovi mezan solvon (Bo); trovi mezan agadmanieron (Da); mezan vojon prave trovi (De); forpuŝi ekcesojn, trovi ĝustan mezom (M).

9) il l' a emporté de justesse sur son concurrent: li apenaŭ/tanĝe venkis sian konkuranton (Bo); li apenaŭ venkis (Bu); li gajnis per minimuma diferenco (Da); nur lastmomente li venkis sian konkursanton(?) (De); etgrade li superis sian konkuranton (M).

10) chercher querelle: provoki, kverelprovi kun iu (Bo); serĉi kaŭzon por kvereli (Bu); eksciti al kverelo (Da); kontraŭ iu batalemi (De); inciti al kverelo, kverelemumi (M).

Jen la dua kvalifiko por 1984: 1) S-ino MICHAU (11); 2) S-ro DAUCHEZ (10); 3) S-ro BOURGOIS (6); 4) S-ro DEGOUL (5); 5) S-ro BURSZTA (4); 6) F-ino STANIENDA (2), kies kontribuaĵo al n° 139 forveturis ĝustatempe el Pollando, sed alvenis post la apero de n° 140.

Jen la novaj proponoj de S-ro Bourgois: 1) je n' en ai cure; 2) brûler les étapes; 3) un coq-à-l' âne; 4) chacun voit midi à sa porte; 5) chercher midi à 14 heures; 6) remonter le courant; 7) il n' est pas à prendre avec des pincettes; 8) manger de la vache enragée; 9) coûter les yeux de la tête; 10) coucher quelqu'un sur son testament.

SIMPLA KASISTINA RIMARKO

Marto 1984: 61 membroj ankoraŭ ne pagis sian kotizon. Mi ĵus sendis al ili alvokon - kosto pli ol 100 F, tute perditaj por la asocia kaso - mi pasigis 4 horojn je tiu seninteresa okupo - mi certe povus pli agrable plenigi mian tempon!

Ĉu niaj ŝatataj membroj, kiuj mem elektis sian asocion, tute libere aniĝis, ne povus esti iom pli atentaj? Mi memorigas, ke la kotizon oni devas pagi TUJ POST APERO DE LA DECEMBRA NUMERO DE FKE, do plej malfrue la 15-an de januaro de la kuranta jaro. Se vi iam dezirus eksiĝi, tiam skribu 2 liniojn al la kasistino ANTAU LA 31-a DE DECEMBRO de la koncerna jaro. Tion jam faras la saĝaj kaj honestaj membroj. Kelkaj eĉ aldonas poŝtmarkon por helpi la kason, kaj mi tre dankas ilin.

Ĉiu ekzameni sian konsciencon kaj sincere respondu la jenajn demandojn:

Ĉu mi estas konscia membro de FKEA?

Ĉu mi ĝustatempe pagis mian kotizon?

Ĉu mi vere helpas en la bona funkciado de FKEA?

Kion pli mi povus fari?

REKORDA KONGRESO EN BLOIS

42 aliĝintoj el 14 departementoj kunvenis dum tri tagoj en Blois. Pli ampleksa raporto aperos en la ~~ĵurnalo~~ oktobra numero.

RAPORTO DE LA PERANTO DE IKUE

Renovigis sian abonon al ESPERO KATOLIKA por 1984: 1. LEEB François; 2. F-ino CHATELUS P. 3. COLAS René-Claude; 4. GOURDON Armand; 5. F-ino PREUX Georgette; 6. VERNIN Louis; 7. VERNIN Paul; 8. S-ro TADDEI; 9. JOSSINET Roland; 10. SANSON Charles; 11. F-ino VANNEAU Emilienne; 12. BECUE Daniel; 13. P. SCHNEIDER Gérard; 14. MAINVIS Fabrice; 15. AMINOT Michel; 16. ROLLAND Romuald; 17. MARAULT Philippe; 18. AUBOSTE Sébastien; 19. FERREIRA Philippe; 20. CORTINHAS Fernand; 21. S-ino CHEVERRY B. 22. BIRON Louis; 23. DEGOUD François; 24. BLOT Louis; 25. LECOCQ René 26. F-ino GOUDE M. 27. F-ino LECORGNE R. 28. FAIRBANK James; 29. DOYELLE Jacques; 30. BARADEL Raymond; 31. THIOLLIERE Eloi; 32. AMOUROUX Jean; 33. PONS Roger; 34. LEGER Bernard; 35. VILLENEUVE Georges; 36. HUBERT René; 37. CUGNY Pierre; 38. FARDET Robert; 39. F-ino STUTZMANN A. 40. DESPINEY Roger; 41. S-ino LEPOUTRE S. 42. P. GOUDE Léon.

+++++

PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNSIDO EN PARIS (19-a de februaro 1984)

Ceestás: P. Bourdon, F-to Marmou, S-inoj Michau kaj Vincent, F-ino Preux, S-roj Bessière, Colas, Despiney kaj Lafargue.

S-ro Pons informas pri la preparoj de la kongreso en Blois.

Petis senkulpigon: S-roj Lecocq kaj Villeneuve.

14 h: malfermo, preĝo por F-ino Le Boëdec, ĵus forpasinta.

Aprobo de la tagordo kaj de la raporto pri la antaŭa kunveno.

FKEA-kongreso: 5/7-an de majo. rogramo: vendredon, akcepto; sabaton, diservo, prezentado de la temo "justeco"; vizito de la urbo; debato pri la temo; dimanĉon, ĝenerala kunveno, komitatkunsido, diservo, ekskurso al Chambord; filmoj pri antaŭaj kongresoj; lundon, ekskurso al Chaumont, Amboise, Chenonceaux.

Informilo: "Jeune chrétien" estas elĉerpita. Bonvolu proponi novan tekston por prezenti la ekumenan lingvon, kiu defendas la homajn rajtojn.

IKUE kaj EK: la artikoloj de P. Bourdon ne aperis.

FKE: ligita al la financoj de la asocio. Oni observu ties regulojn.

Financoj: individua kotizo 30 F. La komitato proponas geedzan kotizon je 40 F.

Lastminuta informo: la ĝenerala kunveno en Blois akceptis tiun proponon.

Diversaĵoj: pluraj gazetoj aperigis artikolojn pri Esperanto (La croix, Le monde, Femmes d' aujourd' hui, Rustica, Vermeil). Legintoj petis informojn.

UFE-kongreso en Bourges: P. Bourdon diservos.

Tombo de P. Peltier: la marmoristo finis la laboron. Por pagi lian fakturon, mankas 1000 F. Sendu vian kontribuadon al P. Bourdon p.ĉ.k. 1909 49 Y LILLE.

Venonta komitatkunsido en Blois dum la kongreso.

17 h: fino per la kanto "Marŝas ni al l' unuec!"

Protokolis: G. Preux.

+++++

SCIENCA ELDONO

BASIC: la programad-lingvo" 152-paĝa kajero, formato A 4, priskribas la diversajn elementojn de BASIC (variabloj, funkcioj, konstantoj kaj instrukcioj), liveras konsilojn por bona programado kaj ekzemplojn de programoj en BASIC; la baza prezo estas 39 FF, rabato de 1/4 ekde 3, de 1/3 ekde 10 + 20 % por la sendkostoj.

Mendoj al: C. BERTIN 60, allée de la Renaudière 35510 CESSON SEVIGNE FRANCLANDO

+++++

DISTRA ANGULO

ARBARLILIA

Arbarlilia estis filino de malriĉuloj. En eta dometo, meze de montaro, vivis maljuna arbohakisto, kiu nomiĝis Bertoldo. Li estis laborema bravulo, sed malriĉega, ĉar li havis multajn infanojn kaj malsanan edzinon. Kiam li volis havigi viandopeceton al sia malsana edzino, li vespere prenis, kelkfoje, sian malnovan pafilon, eniris la arbaron kaj mortigis sovaĝan beston.

Tiutage estis malhela vintrotago. Ekstere neĝis; sed interne, en la ĉambreto, varmis. Tamen ĉiuj sidis malgajaj. Antaŭ unu horo la patrino sendis la plej aĝan knabinon, la dekdujaran Lilian, kiun oni kromnomis Arbarlilia, al ermito, loĝanta an la arbaro. Tie ŝi devis elpreni iom da lakto.

(daŭrigota)

PRI JUSTECO KAJ JUSTICO
=====

Ambaŭ vortoj tradukiĝas per "justice", sed tute ne samsignifas. Laŭ PIV, justeco estas eco de tio, kio estas justa aŭ respektanta egale kaj senpartie la rajtojn de la aliaj homoj, kaj haviganta al ĉiu lian apartenaĵon konforme al la interna juĝo de la konscienco; justico estas ŝtata organismo, kiu zorgas pri elekto de juĝistoj, kontrolo de ilia agado, plenumo de difinitaj punoj... Se ni konscias, ke france, ne nur homoj kaj agoj povas esti "justes", sed ankaŭ horoj, pezoj, muziknotoj, vestoj, oni konstatas, ke en ĉiuj kazoj, tiuj alproksimiĝoj al la vorto "juste" estas la malo de mensa senmoraligado aŭ de konkreta malordo. Tio kondukas al la difino de Platon: maljusta estas la animo, kiu cedas al pasiaj orgojlo, monavido kaj ties sekvoj. Per tio li donas al "justeco" la signifon de individua, interna harmonio submetita al honor-reguloj, tiel necesaj kiel akordiĝo en muziknotoj aŭ horaroj.

Socia justeco devenas de individuaj, ĉar homo-egaleco estas la bazo mem de justeco, kiu respondas nepran bezonon de la homoj, kaj evidentiĝas, ke kristanismo alportis al ĝi plian disvastiĝon. Por kristanoj, egaleco, do justeco, devenas de Dio mem, ĉar la dia amo faris similaj ĉiujn animojn. Esti justa signifas, ke ni devas konsideri ĉiun homon kiel unu, kaj akcepti la ekziston de tiu aliulo same kiel la nian, sekve, respektu ĝin. Tio enkondukas ĝeneralan rekonon de egalrajteco por ĉiuj homoj. Justa homo estas tiu, kiu ne aljuĝas al si unikan valoron, sed rekonas samvaloron ĉe aliuloj kaj estas preta juĝi senpartie en komunaj interrilatoj.

Ideo pri justeco enkondukas en homekziston, rigorajn plibonigojn, kies sekvoj povus lasi al kompato, helpofero, rarajn okazojn manifestiĝi. Tamen, justeco restas postulema kaj severa, ĉu al la homo mem, ĉu al la aliuloj. Iri al alia kiel ajn estas ĝia aspekto, alparoli ĝin, estas jam justecoprovo. Tiel, oni agnoskas egalecon inter ĝi kaj ni. Sed ne sufiĉas sin konsideri kiel egalulon de la aliaj, necesas doni al ili la emon kaj eblon kalkuli nur pri si: jen, laŭ mi, valora justeco.

Resumita kompilado de S-ino B. CHEVERRY

%%%%%%%%%%

NI KONSTRUU EUROPON, SED KIAN ???

MESAĜO DE LA EPISKOPOJ DE LA EUROPA KOMUNUMO

... "La ekonomia progreso estas je la servo de la homo, kaj ne inverse. La Eŭropa Komunumo ne povas kontentiĝi esti komuna negoco, kiel necesa estu tiu ĉi. Necesas, ke oni konstruu Eŭropon de la homoj kaj de la popoloj, Eŭropon, kie ĉiu homo kaj ĉiu familio estu rekonitaj kun sia nealiproprigebla digneco, Eŭropon, kie ĉiu kulturo kaj ĉiu spirita komunumo interdisvolviĝu kaj interriĉiĝu, Eŭropon, kie enmigrantoj kaj rifuĝintoj trovu sian lokon, Eŭropon, kiu rigardu la triamondajn landojn kiel aŭtentikajn kunludantojn, kunlaborantojn. La Komunumo bezonas novajn inspiron, animon kaj fidon.

Konstrui tian Eŭropon estas tasko-kune plenumenda. Ĝi ne povas esti farita de la nuraj politikaj respondeculoj aŭ de la eŭropanaj funkciuloj. Ĉiu povas kaj devas alporti sian ŝtonon al la konstruo. Estas mil manieroj labori por ĝi: preterpasante el la pasinteco hereditajn rankorojn kaj antaŭjuĝojn; partigante kun la plej senprovizuloj; inicante al aliaj lingvoj kaj al aliaj kulturoj; partoprenante en internaciaj asocioj kaj renkontoj..."

Trad. L. BOURDON

P.S. El la lasta frazo, ĉiu esperantista kristano komprenas kiel mirindan kaj fruktodonan agadon povas plenumi la gesamideanoj en la nuntempa konstruado de vivanta Eŭropo! Ni do agadu en niaj internaciaj asocioj kaj kongresoj, kuraĝe kaj espere!

L.B.

%%%%%%%%%%

ĈU VI SCIAS? Kia estas la deveno de la vorto "cigano", per kiu oni nomas la eŭropajn nomadojn? Kelkaj asertas, ke ĝi venas el la greka "Adinganoj", nomo de antikva azia popolo; aliaj, ke ĝi venas el la latina "aegyptanus", kiu signifas egipto. Fakte en la antikvaj jarcentoj, oni pensis, ke Egiptujo estas ilia devenlando. En la hispana oni nomas ilin "gitanos", en la franca "gitans", en la hungara "Tzigan", en la angla "gypsi". Kiel oni konstatas, ĉiuj vortoj havas la saman originon. Tiel ŝajnas plej vera la tezo, kiu devenigas la vorton el egipto.

ESPERANTO EN RADIO

0.00-0.15 Rio de Janeiro:	kHz 1400	(9)
	m 214	
0.30-1.00 Pekino	: kHz 11515-9860	(1)
	m 26,05-30,43	
0.45-1.00 Zagrebo	: kHz 1143	(10)
	m 262	
2.00-3.00 Sorocaba	: kHz 1080	(13)
	m 278	
7.30-8.00 Polonia	: kHz <u>7270-6135-5995-1503</u>	(1)
	m <u>41,27-48,90-50,04-200</u>	
7.40-8.00 KELI	: kHz <u>11835</u>	(12)
	m <u>25,35</u>	
7.45-7.57 Vieno	: kHz <u>9770-6155-5945</u>	(2)
	m <u>30,71-48,74-50,46</u>	
8.00-8.20 Vatikano	: kHz 15120-11715-9625-7250-6250-1611	(3)
	m 19,84-25,61-31,17-41,38-48,00-186	
11.45-11.57 Vieno	: kHz <u>7170-6155</u>	(2)
	m <u>41,84-48,74</u>	
13.00-13.25 Polonia	: kHz <u>9525-7145</u>	(1)
	m <u>31,50-41,99</u>	
13.00-13.30 Pekino	: kHz 9880-7315	(1)
	m 30,36-41,01	(4)
14.00-15.00 R. Esperanto:	MHz 89,5	
15.00-15.30 Pekino	: kHz 17745-15165	(1)
	m 16,91-19,78	
17.30-17.55 Polonia	: kHz <u>9675-7285</u>	(1)
	m <u>31,01-41,18</u>	
18.30-18.55 Polonia	: kHz <u>7285-6095</u>	(1)
	m <u>41,18-49,22</u>	(6)
19.00-20.00 R. Esperanto:	MHz 89,5	(7)
19.20-19.25 Expression N:	MHz 94,7	
20.00-20.15 Berno	: kHz <u>9535-6165-3985</u>	(5)
	m <u>31,46-48,66-75,28</u>	
21.00-21.10 Vatikano	: kHz <u>15120-11700-9645-9625-7250-6250-6190-1530</u>	(11)
	m <u>19,84-25,64-31,10-31,17-41,38-48-48,47-196</u>	
21.30-22.00 Polonia	: kHz 7285-6095	(1)
	m 41,18-49,22	
22.00-22.20 Romo	: kHz 11800-9710-7275	(8)
	m 25,42-30,90-41,24	
22.00-22.30 Pekino	: kHz <u>9965-9365-7470</u>	(1)
	m <u>30,11-32,03-40,16</u>	
22.30-22.45 Berno	: kHz 9535-6165-3985	(5)
	m 31,46-48,66-75,28	
23.10-23.30 KELI	: kHz 17790	(12)
	m 16,86	
23.30-23.55 Polonia	: kHz 7285-6095-5995-1503	(1)
	m 41,18-49,22-50,04-200	

(1) ĉiutage-(2) dimanĉe-(3) ĵaŭde-(4) merkrede, nur pariza regiono-(5) lunde, ĵaŭde, sabate-(6) vendrede, nur pariza regiono-(7) la 3-am lundon, nur Lille-regiono (8) sabate-(9) lunde-(10) merkrede-(11) dimanĉe-(12) la 1-am mardon-(13) lunde La horoj estas la franca somera horo.

La substrekitaj ondolongoj estas aŭskulteblaj en Franclando.

Ne sufiĉas aŭskulti, necesas OFTE SKRIBI por montri vian intereson:

R. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio av. Passos 30 BR-20051 Rio de J(RJ)

R. Pekino: Esperanto-fako Beijing Popola Respubliko Ĉinujo

R. Zagrebo: Esperanto-fako YU-Zagreb Jugoslavujo

R. Sorocaba: Radio Clube de Sorocaba, Esperanto-redakcio Rua da Penha 455 BR-18100 Sorocaba (SP) Brazilo

R. Polonia: Esperanto-redakcio Poŝtkesto 46 PL-00950 Warszawa Pollando

R. Keli: Radio HCJB, Box 110 S-54201 Mariestad Svedujo.

R. Vieno: O.R.F. Esperanto-fako A-1136 Wien Aŭstrujo

R. Vaticana: Esperanto-fako Piazza Pia 3 I-00193 Roma Italujo

R. Berno: Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako CH-3000 Bern 15 Svislando

R. Romo: Radio Roma Esperanto C.P. 320 I-00100 Roma Centro Corr. Italujo

LA VALO DE AOSTO EN ITALUJO
=====

Vi certe scias, kie kuŝas tiu valo, kiu etendiĝas de Blanka Monto ĝis la lombarda ebenaĵo. Kial mi elektis tiun regionon por pasigi miajn feriojn? Tio ĉi estas demando, kiu mi povas facile respondi: unue mi tre ŝatas la montaron kaj pro tio deziris vidi la valon ĉirkaŭitan de la plej altaj montoj en Eŭropo kaj rigardi la belegajn plejaltaĵojn, la vastajn glaciejojn kaj la mirindajn panoramojn, kiel estis skribite sur la faldfolioj de la turisma oficejo! Mi ankaŭ legis, ke en tiu valo oni parolas la francan lingvon, kaj, kvankam mi sufiĉe bone scipovas la italan, mi decidis viziti tiun regionon, kie Francoj estas konsiderataj kiel samlandanoj.

Mi do uzis en Torino la vagonaron al Aosto kaj tuj post Ivrea (kie oni fabrikas la skribmaŝinojn Olivetti), mi rimarkis, ke la valo malgrandiĝas, kaj rapide alveninte en Pont St-Martin, mi tuj konstatis, ke mi jam estas en la valo. Proksime al la stacidomo staris blanka lernejo kun dulingva skribaĵo: scuole elementari-écoles élémentaires. Mi ja estis en la regiono de Aosto. Sed kial tiu dulingva skribaĵo? Ĉu ni ne estas en Italujo? Jes ja, sed depost la 7-a de septembro 1945, la valo de Aosto ricevis sendependecon pri la internaj aferoj t.e. saneco, publikaj laboroj, kamparanaj aferoj, stratoj, lernejoj, turismo... En ĉiuj lernejoj oni instruas la francan lingvon same kiel la italan kaj en ĉiuj urboj la stratoj havas du ŝildojn: sur la dekstra flanko ĝi estas itallingva, sur la alia franclingva. Tamen mi devas diri, ke mi neniam aŭdis la loĝantojn paroli inter si la francan lingvon. Ili ĉiuj bonege scipovas nian lingvon, sed uzas inter si dialekton. Tiu ĉi estis por mi tute nekomprenebla, sed oni diris, ke ĝi multe similas tiun parolatan en Savojo.

En la urbo Aosto mi restadis kvin tagojn, kaj tiun restadon mi tre ŝatis. Aosto estas ja malgranda urbo (nur 24000 enloĝantoj), sed ĝia kvieta aktiveco (se mi povas uzi tiujn malamikajn vortojn) tre plaĉis al mi; ĉiumatene mi sidis en la publika ĝardeno por legi la ĵurnalon kaj babilu kun la emeritoj, venintaj por pasigi la tempon en malvarmeta loko. Posttagmeze mi vizitis la vidindaĵojn en la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj.

Aosto estas riĉa je malnovaj monumentoj: ĉe la alveno oni tuj rimarkas romianan triumfarkon, konstruitan en la jaro 25 antaŭ Kristo, kiam Romo starigis la urbon, nomitan Aŭgusta Praetoria honore al Aŭgusto kaj ĉar ĝi estis restadejo de pretorianoj t.e. imperiestraj militistoj. La triumfarko situas en impona loko, de kie oni vidas du altajn montojn, ĉiam neĝkovritajn, norde Grand Combin ĉe la svisa landlimo, sude Monton Maximus.

Alia vidindaĵo estas la preĝejo S-ta Urso, konstruita en la 12-a jarcento. Kaj kia estis mia surprizo vidi, ke la skribaĵoj de la krucovojo estis franclingvaj, kiel en ĉiuj aliaj preĝejoj de la valo! Sed dum mia vizito la virinoj, kiuj mi trovis preĝantaj la rozarion, faris tion itale! Kontrasto, ĉu ne, de la dulingveco en la valo!

Apud la preĝejo, klostro longe kaptis mian atenton kaj mi vere ĝuis ĝiajn mallumon kaj ripozigon. Mi klopodis kompreni la strangajn skulptaĵojn, ĉiujn diversajn, de la kolonetoj. Laŭ la gvidlibro, ili prezentas bibliajn scenojn, sed bedaŭrinde mi ne sukcesis kompreni.

En la ĉirkaŭaĵoj de Aosto troviĝas multaj mezepokaj kasteloj; mi vizitis nur du: Issogne kaj Féris. Tiajn kastelojn oni malfacile atingas per malbona vojeto kaj pro tio la turistoj estas ne multnombraj. Des pli bone, ĉar oni vizitas en grupoj de dek homoj kaj tiel povas pli bone rigardi. Kompreneble mi ne povas priskribi ĉiujn detalojn de la du kasteloj. Mi preparolos nur la ĉefajn: en la kastelo Issogne okulfrapas fontano meze de kiu staras arbo el fero kum branĉoj kaj folioj. Tiu fera arbo fabrikita en 1480 estas tiel bone farita, ke ĝi aspektas kiel vera arbo. La kastelo Féris superstaras la valon kaj ankoraŭ havas siajn krenelajn murojn. Ties militista aspekto estas severa, sed interne la korto havas galerion, kun granda murpentraĵo, kies koloroj estas ankoraŭ tiel freŝaj, ke la bildigitaj homoj ŝajnas akcepti la gastojn kaj inviti ilin al longa restado. Bedaŭrinde la tempo rapide forflugis kaj mi devis daŭrigi mian vojaĝon ĝis la plej alta punkto de la valo. En Pré St-Didier, je 1000 m super la marnivelo, mi forlasis la vagonaron kaj aŭtobuso kondukis min ĝis Courmayeur. Alveni al tiu famkonata urbeto estas neforgesebla momento: en la fando de la valo staras Blanka Monto tute neĝkovrita kaj Courmayeur kuŝas, kiel diris la itala poeto Carducci "ĉe la piedo de l' giganto de Alpoj".

Nur du ekskursojn mi rakontos al vi. La unua kondukis min al lago Miage. Per aŭtobuso, kiu suprenveturis sur terure mallarĝa vojo, mi atingis La Visaille,

kaj poste mi daŭrigis piede; iom post iom la abioj iĝis malmultaj kaj fine oni alvenas en altan valon kaj aŭdas nenium bruon; nek besto nek homo vivas tie. La lago Miage estas proksima sed por ĝin vidi oni devas ankoraŭ iomete grimpi, kaj tiam mirinda spektaklo: ĉe la piedo de la glaciejo Miage, je 2000 m super la marnivelo, verdblua lageto kuŝas; la silenton interrompas nur la glacieroj falantaj en la lagon, kiam la suno forfluidigas la glacieron.

La dua ekskurso kondukis min en multe pli altan punkton, je 3322 m super la marnivelo, meze de la eternaj neĝoj. Tiu ekskurso estas tre facila eĉ por simpla turistoj, ĉar telfero portas la vojaĝanton ĝis la rifuĝejo Torino. Nun oni povas daŭrigi la vojaĝon ĝis Chamonix, sed tiam la telfero ĝis Chamonix ne ekzistis. Tamen sufiĉis al miaj okuloj tio, kion ili vidis: 2000 m sube de mi, la valo de Courmayeur kuŝis kun siaj domoj, stratoj kaj riveroj. Tute proksime al la rifuĝejo Torino, trans la blanka neĝo kovranta malgrandan ebenajon, staras la monto Dento de l' Giganto, kiu ŝajnas atentigi la homojn pri la senfina grandeco de la loko. La vojaĝo jam finiĝas kaj mi ree envagoniĝas por transiri la tutan valon de Aosto ĝis Pont St-Martin, kie por la lasta fojo mi rigardas la dulingvan skribaĵon de la lernejo kaj lasas la regionon de Aosto daŭrigi ŝian vojon al sendependeco kaj progreso.

A. B.

+++++

ENHAVO

- | | |
|----------------------------------|----------------------------------|
| 1.2. Bileto de la prezidanto | Arbarlilia |
| 2. Vidalvide | 5. Pri justeco kaj justico |
| Ni funebras | Ni konstruu Eŭropon, sed kian? |
| 3. Lingva angulo | Ĉu vi scias? |
| Simpla kasistina rimarko | 6. Esperanto en radio |
| 4. Raporto de la peranto de IKUE | 7.8. La valo de Aosto en Italujo |
| Protokolo de la komitatkuŝido | 8. Kotiztabelo |

+++++

KOTIZTABELO

IKUE kun "Espero Katolika"	75 F
Peranto: P. Degrelle c.c.p. NANCY, 2 555 38 L.	

ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" (individuo)	30 F
Geedza paro	40 F
Infanoj ĝis 16-jaraj, pastroj, religiul(in)oj	15 F
Bonfarantoj	150 F
Dumvivaj membroj	600 F

UFE kun "Revue Française"	155 F
UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro	190 F

Abono al "Biblia Revuo"	50 F
-------------------------	------

Association Catholique Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2324 93 N.

+++++

Dépôt légal: 2ème trimestre 1984	!! Photocopié par l' A. C. F. E.
C.P.P.A.P. n° 62 532.	!! Prieuré St-Martin.
Directeur: R. Cl. Colas	!! La Houssaye-en-Brie
Directeur-délégué: R. J. Marmou	!! 77610 FONTENAY TRESIGNY.
	!! FRANCE